
畏敬の念

Timo kaj Estimo

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

小学校高学年および中学校学習指導要領（道徳）には、「人間の力を超えたものに対する畏敬の念をもつ」という一項があります。一見するとけっこうなことのように思われるかも知れませんが、しかしちょっと待って下さい。

畏敬とはどういうことでしょうか？それは、畏（おそ）れ敬う、ということです。敬うのはよいとしても、畏れるというのはどうでしょう？仏教では、畏れは克服すべき感情です。観音菩薩は、私たちに畏れの無い精神を与えて下さる「施無畏者」である、と観音経には説かれているように、畏れることのない精神こそが仏教徒の目指す方向です。それゆえ、学校の道徳の授業で、畏敬を教え込んでもらっては困るのです。

畏れとは、恐れ・怖れとも共通する感情ですが、微妙に違いがあります。具体的には、神罰・祟り・呪いといった、理性ではとらえられないような、それこそ人知を超えたものへの恐怖心を意味します。そして、これが原始宗教の出発点でもあります。例えば、雷を「天神の怒り」として畏れ、天満宮やゼウス神殿を造ってお祀りする、ということがあります。

私たち仏教徒にとっては、しかしながら、神といえども畏れの対象ではありません。親鸞聖人の御和讃に、

La direktivo pri instruado de moralo por elementaj kaj mezaj lernejoj priskribas: ili havu la senton de timo kaj estimo al tio, kio superas la homan forton. Unuavide eble vi opinias, ke tiu ĉi direktivo estas bona. Sed pripensu pli atente.

Kion signifas la sento de timo kaj estimo? Mi diras momente nenion pri estimo, sed kio pri timo? Laŭ budhisma vidpunkto la sento de timo devas esti konkerita. La sutro pri Avalokiteŝvaro diras, ke la bodhisatvo bonvolas doni al ni la spiriton sen timo, do Avalokiteŝvaro estas donanto de sentimo. Ĉi tiel la spirito sentima estas la direkto, kiun ni budhanoj celas. Tial, estas malbonvene, ke oni gvidas infanojn al la sento de timo kaj estimo en lecionoj pri moralo.

Timo, interalie tiu rilata al religio, estiĝas pro aĵoj malraciaj, kiujn nia intelekto ne komprenas, kiel ekzemple dia puno, plago, malbeno k.t.p. Jen ĝi estas la origino de praa religio. Ekzemple niaj prauloj timis fulmotondron kiel koleron de ĉiela dio kaj deziris kvietigi ĝin per konstruado de la sanktejo *Tenmanguu* en Japanio aŭ *Olympeion* en Grekio.

Por ni budhanoj tamen eĉ dio ne estas objekto de timo. Ŝinran skribis en la himnaro:

「南無阿彌陀佛をとふれば 梵王帝
釋歸敬す 諸天善神ことごとく よる
ひるつねにまもるなり」

「天神地祇はことごとく 念佛のひと
をまもるなり」とありますように、逆
に神の方が私たちを敬い守るのです。

私たち日本人にとって、本当の意味
での道徳はまだ定着していないのでは
ないか、と思うことがあります。とい
うのも、たとえば公共の場所で自分
の子どもが騒いでいても叱らない・叱れ
ない親が多いのですが、叱ったとして
も、「恐いおじさんに叱られるからや
めておきなさい」というような叱り方
でしかありません。また、今はほとん
ど聞かれなくなりましたが、かつて
「仏様の罰（バチ）があたるからやめ
ておきなさい」と言って子どもを叱っ
ていた親がいたものです。これでは子
どもは、「なぜしてはいけないのか」
を正しく理解できません。神仏の罰・
祟りを畏れて悪事をなさない、とい
うのは、強盗をしたら警察に捕まって
刑務所に入れられるからやめておこ
う、というのと同じ下劣な発想でしか
ありません。

ちなみに、仏罰はうそです。仏は、
私たち凡夫を憐れみ救う方ではあつ
ても、悪事を犯したからといって罰を
与えることは決してありません。

本当の道徳は他者への慈愛の心を基
礎とするものです。そしてその心はま
ったく非功利的なものであって、いわ
ゆる御利益（ごりやく）を期待するよ
うな心情とは対極にあるものです。

"Se ni vokas la nomon de Amitabo,
Brahmo kaj Indro respektas nin; ĉielaj
bonaj dioj gardas nin dum tago kaj
nokto."

"Ĉiuj ĉielaj kaj teraj dioj gardas
respektantojn de Amitabo."

Ĉi tiel dio gardas kaj respektas nin, sed
ne male.

Foje mi pensas, ke la vera moralo
ankoraŭ ne enradikiĝis en la menson de ni
japanoj. Jen kialo: ekzemple en publika
loko infanoj bruegas kaj tamen iliaj
gepatroj ne skoldas ilin, aŭ nur riproĉas
dirante, "Estu kvieta, ĉar tiamaniere vin
skoldos tiu timinda viro." Kvankam nun
malofte, iam multaj gepatroj skoldis siajn
infanojn, "Detenu vin. Se ne, budho
punos vin." Sed tiamaniere infanoj ne
povas ĝuste kompreni, kial tiaj agoj estas
malbonaj. Se oni detenas sin de malbonaj
agoj pro timo al puno de dio aŭ budho,
tio devenas de nur malnobla motivo,
same kiel oni detenas sin de rabo pro
timo al aresto fare de polico kaj sekve
eniroy en karceron.

Cetere, puno de budho estas fikcia.
Budho estas tiu, kiu kompatas kaj savas
sed neniel punas nin banalajn estaĵojn,
kiuj vole nevole faras malbonajn agojn.

La vera moralo bazas sin sur la koro de
kompato kaj amo al aliaj estaĵoj. Kaj tiu
koro estas tute malegoisma kaj ĝi faras
kontraston kun atendo de surtera profito.